






# Kokino kaj Aglo

## Hen and Eagle



-  Ann Nduku
-  Wiehan de Jager
-  Espen Stranger-Johannessen
-  3
-  Esperanto [eo](#) / English [en](#)



Iam Kokino kaj Aglo estis amikoj. Ili vivis en paco kun ĉiuj aliaj birdoj. Neniu el ili sciis flugi.

...

Once upon a time, Hen and Eagle were friends. They lived in peace with all the other birds. None of them could fly.



Iun tagon regis malsato en la lando. Aglo devis paŝi tre malproksimen por trovi manĝaĵon. Ŝi revenis tre laca. "Devas esti pli facila maniero vojaĝi!" diris Aglo.

...

One day, there was famine in the land. Eagle had to walk very far to find food. She came back very tired. "There must be an easier way to travel!" said Eagle.



Post bona dormo Kokino havis brilan ideon. Ŝi komencis kolekti la falintajn plumojn el ĉiuj siaj birdaj amikoj. “Ni kudru ilin kunen super niaj propraj plumoj,” ŝi diris. “Eble tio faros vojaĝi pli facila afero.”

...

After a good night’s sleep, Hen had a brilliant idea. She began collecting the fallen feathers from all their bird friends. “Let’s sew them together on top of our own feathers,” she said. “Perhaps that will make it easier to travel.”



Aglo estis la sola en la vilaĝo kun kudrilo, do ŝi komencis kudri unue. Ŝi faris al si paron da belaj flugiloj kaj flugis alta super Kokino. Kokino prunteprenis la kudrilon, sed ŝi baldaŭ laciĝis pri kudrado. Ŝi lasis la kudrilon sur la ŝranko kaj iris en la kuirejon por prepari manĝaĵon por siaj infanoj.

...

Eagle was the only one in the village with a needle, so she started sewing first. She made herself a pair of beautiful wings and flew high above Hen. Hen borrowed the needle but she soon got tired of sewing. She left the needle on the cupboard and went into the kitchen to prepare food for her children.



Sed la aliaj birdoj vidis Aglon flugi for. Ili petis Kokinon prunti al ili la kudrilon por fariflugilojn ankaŭ por ili mem. Baldaŭ birdoj flugis ĉie supre en la ĉielo.

...

But the other birds had seen Eagle flying away. They asked Hen to lend them the needle to make wings for themselves too. Soon there were birds flying all over the sky.



Kiam la lasta birdo redonis la pruntitan kudrilon,  
Kokino ne estis tie. Do ŝiaj infanoj prenis la kudrilon  
kaj ekludis kun ĝi. Kiam ili laciĝis pri la ludo, ili lasis  
la kudrilon en la sablo.

...

When the last bird returned the borrowed needle,  
Hen was not there. So her children took the needle  
and started playing with it. When they got tired of  
the game, they left the needle in the sand.



Poste tiun posttagmezon, Aglo revenis. Ŝi petis la kudrilon por ripari iujn plumojn kiuj malfiksiĝis sur ŝia vojaĝo. Kokino rigardis la ŝrankon. Ŝi rigardis en la kuirejon. Ŝi rigardis en la korton. Sed la kudrilo troviĝis nenie.

...

Later that afternoon, Eagle returned. She asked for the needle to fix some feathers that had loosened on her journey. Hen looked on the cupboard. She looked in the kitchen. She looked in the yard. But the needle was nowhere to be found.





“Nur donu al mi tagon,” Kokino petegis Aglon. “Tiam vi povos ripari vian flugilon kaj flugi por akiri manĝaĵon denove.” “Nur unu tagon pli,” diris Aglo. “Se vi ne trovos la kudrilon, vi devos doni al mi unu el viaj idoj kiel pagon.”

...

“Just give me a day,” Hen begged Eagle. “Then you can fix your wing and fly away to get food again.” “Just one more day,” said Eagle. “If you can’t find the needle, you’ll have to give me one of your chicks as payment.”



Kiam Aglo venis la venontan tagon, ŝi trovis Kokinon skrapantan en la sablo, sed neniŭ kudrilo. Do Aglo flugis tre rapide kaj kaptis unu el la idoj. Ŝi forportis ĝin. Ĉiam post tiam, kiam ajn Aglo aperas, ŝi trovas Kokinon skrapantan en la sablo por la kudrilo.

...

When Eagle came the next day, she found Hen scratching in the sand, but no needle. So Eagle flew down very fast and caught one of the chicks. She carried it away. Forever after that, whenever Eagle appears, she finds Hen scratching in the sand for the needle.



Kiam la ombro de la flugilo de Aglo falas sur la kampo, Kokino avertas siajn idojn. "Eliru el la nuda kaj seka tereno." Kaj ili respondas, "Ni ne estas malsaĝuloj. Ni kuros."

...

As the shadow of Eagle's wing falls on the ground, Hen warns her chicks. "Get out of the bare and dry land." And they respond: "We are not fools. We will run."



# Global Storybooks


[globalstorybooks.net](http://globalstorybooks.net)

**Kokino kaj Aglo**

**Hen and Eagle**

 Ann Nduku

 Wiehan de Jager

 Espen Stranger-Johannessen (eo)

